# KATOLIKA SENTO



SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

**KATOLICA SENTO** **50ª jaro**

n° **11** - novembro 1971

(Bollettino mensile)

# DOLORA KRIO (1)

"Ni devas ankoraŭfoje paroli al vi pri la suferoj de aliaj homoj, kalkulante je via komprenemo kaj je via grandanimeco. Nia ofico devigas nin fariĝi interpretantoj de grandegaj bezonoj, kiuj ne lasas trankvila la konsciencon, al kiu alvenas ilia voĉo: ĝi estas voĉo de lamento, ĝemo de plorpetado.

Ĝi estas la voĉo de la Rifuĝintoj. Rifuĝintoj kaj loĝantaro de orienta Pakistano: estas milionoj da homaj estaĵoj en kondiĉoj de ekstremaj bezonoj. Sinsekvaj malfeliĉoj falis sur tiun mizeregan genton. La informoj ne mankas, kaj ili donas al ni terurajn ciferojn, kaj diras al ni la senkuraĝigan misproporcion inter la grandegeco de la malfeliĉoj kaj la nesufiĉa kvanto de la helpoj. Necesas veki la senton de humaneco de la mondo, por savi la vivon de sennombraj homaj estaĵoj ĉe la sojlo de la morto. La institucioj publikaj kaj privataj, inkluzive de la niaj, estas agantaj; sed kiel ili povas malebligi la sekvojn de malfeliĉegoj pli grandaj ol iliaj rimedoj? Ne ŝajnas troigo atendi, ke la mondo ekkompatu kaj sendu la helpojn nepre necesajn: nutraĵojn, vestojn, medikamentojn, monon.

Venas al ni la vertiĝoj je la penso, ke ankaŭ aliaj landoj de la tero, proksimaj kaj malproksimaj, troviĝas

---

(1) Alvoko de Papo Paŭlo la 6-a, antaŭ la recitado de la Anĝeluso, dimanĉon, la 3-an de oktobro 1971-a.

en analogaj kondiĉoj, kvankam ne tiel gravajkiel tiuj ĵus priparolitaj.

Ni lanĉas ĉi tiun krion doloran, esperante kaj preĝante. Ni proponas, ke,la 10-an de oktobro, la filoj de la katolika eklezio kaj ankaŭ la fratoj kristanaj kaj la kredantoj de ĉiuj religiaj konfesioj kuniĝu en unuanima movado de petego al la Sinjoro pere de preĝo kajde fasto. Pere de la preĝo, ĉar la paco kaj la reveno de la familioj al siaj devenlokoj estas problemoj, kiuj ne povas esti konvene solvataj per la nuraj homaj fortoj; pere de la fasto, ĉar la fasto plaĉas al la Sinjoro kaj komprenigas al ni la malsaton de la aliaj: fasto de solidareco, kiu esprimiĝas, laŭ la eblecoj, aŭ per la rezigno kaj samtempe per la ofero de iu bono, aŭ nur per la senigado de io, kion oni rajtus, por partopreni tiamaniere, persone, en la suferoj de tiuj provitaj popoloj. En la kampoj de la rifuĝintoj troviĝas - oni diras - 800,000 infanoj, elĉerpitaj, malsanaj, subnutritaj. Precipe por ili ni lanĉas ĉi tiun alvokon.

Tiamaniere, ni pensas esti la interpretantoj de tiomaj korpremoj, pri kiuj ni ricevas la senĉesan eĥon.

La Virgulino sanktega, kiu spertis, ankaŭ ŝi, kun sia Dia Filo, la doloran kondiĉon de rifuĝinto, malfermu la koron de ĉiuj homoj por ĉiuj ĉi tiuj doloroj. Al la Madono ni konfidas nun ĉi tiun intencon".

ANTAŬ LA TERURAJ SUFEROJ DE LA Pakistana popolo, apenaŭ imageblaj por ni, geografie tiel malproksimaj, laŭ la patrosenta alvoko de la Papo, eĥita de la sinodaj Patroj kaj de la Itala Episcopa Konferenco, UECI kaj CECR respondis ne nur per la preĝado tiuintence farita dum la esperanta meso la 10-an de oktobro de la roma samideanaro, sed ankaŭ sendante al la papo ankoraŭfoje 50.000 lirojn por Pakistano.

NIA BONFARA KASO estas malfermita al ĉiuj: ni invi-

tas ĉiujn niajn legantojn partopreni kun katolika sento en tiu frata helpo. Oni povas, se necese, uzi la samajn kondiĉojn, kiujn ni indikis por abonoj.

La 23-an de oktobro ni ricevis la jenan respondon: "La Ĝenerala Sekretariato de la 'Conferenza Episkopale Italiana' certigas la Resp. P Hiacinton Jacobitti kaj la Roman Esperantistan Katolikan Centron, ke bonorde alvenis la malŝpara monofero, destinita por helpo al la rifuĝintoj de la Orienta Pakistano, kaj esprimas la plej varman dankon por la signo de kristana solidareco, per kiu oni volis frate partopreni en la suferoj de tiu popolo. La Ĝenerala Sekretario: Mons. A. Pangrazio.

OKAZE DE LA 42-a Itala Kongreso de Esperanto en Grosseto, dimanĉon la 19-an de septembro, dum la inaŭguro, P.A. Ciccanti, prezidanto de UECI, salutis la Kongreson je nomo de la Unuiĝo, substrekante, ke la katolika eklezio oficialigis Esperanton por la liturgio, antaŭvidante tiel la necesojn de la popoloj en la estonteco. Posttagmeze dum la IEF-Kongreso lia Moŝto la Apostola Administranto Mons. Primo Gasparri, vizitis la kongreson. Gratulinte la ĉeestantaron li kompetente parolis pri semitaj lingvoj kaj Esperanto, reliefigante, ke la simpleco de Esperanto, moderna lingvo, similas al la simpleco de la pralingvoj, permesante tamen esprimi teknike aŭ lirike ĉiun temon, kiel montriĝas el la jam abunda biblioteko de esperantaj verkoj originalaj aŭ tradukitaj. Vespere je la 19-a en la katedralo de Grosseto okazis la sankta meso en Esperanto. Celebris kaj predikis P. Ciccanti. Ĉirkaŭ 700 personoj esperantistoj kaj ne esperantistoj partoprenis en la sankta meso. Ĉiuj ricevis tre bonan impreson pri la perfekta organizado.

## CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO
## N° 99

BAPTO-CEREMONIO EN ESPERANTO dum la unua kunveno de la nova socia jaro de la romaj esperantistoj. Post la meso celebrita en la baziliko S. Maria Maggiore, la 3-an de oktobro, kun ĉeesto de bela nombro da



samideanoj, inter kiuj ankaŭ kelkaj eksterlandaj esperantistoj, la grupo kunvenis ĉe la bela bapto - kapelo de S.Maria Maggiore por la bapto de la unua filino de Pasquale kaj Elizabeta Remènyi Puracchio (v.K.S. n° 10, p.222). Por la unua bapto-ceremonio oni ne povis elekti pli solenan kaj taŭgan kadron. La Ĉielenprenita, skulptita de Bernini meze de festantaj bukloriĉaj anĝeletoj ŝajnis ĉeesti tiumomente, por akcepti inter ilian-

kaŭ la novan anĝeleton, Annalisa, kiu ricevis kun la sa kramento la sanktecon de la graco puriganta kaj donanta la dokumenton de la adoptiĝo, kiel filino de Dio, kun rajto al la eterna ĝojo de la paradizo. Ŝajnis kompleze rigardi el siaj monumentoj ankaŭ la papoj Gregoro XIV, Benedikto XIII, Klemento XII, Benedikto XIV, Pio IX, kun la konga ambasadoro de Paŭlo V, Antono la Negro, el nigra marmoro. Ĉiuj samideanoj sekvis pie la liturgion laŭ la renovigita eklezia rito, kun la teksto por la plej bona kompreno kaj partopreno en la escepta okazaĵo, kio kulminis kiam el la porfira vasko la baptanto prenis la akvon kaj surverŝis per ĝi trifoje la kapeton de la infano, eldirante la sakramentajn vortojn: "Anna-lisa, mi vin baptas en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito". Post la ceremonio la grupo rekuniĝis antaŭ la portiko de la baziliko por la foto.

ĜOJA EVENTO EN LA FAMILIO de Prof. Carlo kaj Luisella Minnaja en Padovo: la 9-an de oktobro naskiĝis Fabio. Al la ĵusnaskito, al la feliĉaj gepatroj kaj geavoj Luigi kaj Carolina Minnaja, CECR bondeziras kaj tutkore gratulas.

LA 21-an DE LA PASINTA SEPTEMBRO, post longa malsano forpasis, je la aĝo de 88 jaroj en sia Florenco prof. Corrado Grazzini, honora ĝenerala direktoro de la Itala Instituto de Esperanto kaj fondinto de nia UECI. La meso, kiun ni aŭskultis la 10-an de oktobro okaze de nia kutima dimanĉa kunveno, estis oferita por lia animripozo. Ĉeestis, krom la esperantistoj, ankaŭ la fratino de la forpasinto, s-ino Maria Amelia Severi Grazzini; kaj en la posta renkontiĝo s-ano Luigi Minnaja inde memorigis lian noblan figuron. La oratoro reliefigis la multajn kaj grandajn meritojn de Prof. Grazzini en la esperantista kampo, en kiu li fervore dediĉis sian tutan liberan tempon. Sufiĉas primemori la unuan Italan Es-

peranto-Kongreson, kiu, de li organizita en 1910, ĵetis la fundamentojn por la estonta agado. Fakte en tiu kongreso fondiĝis la 21-an de marto la Itala Esperanto-Federacio. En la sama jaro, okaze de la 12-a Itala Kongreso de la Instruistoj en Florenco estis proponita la starigo de la "Associazione Italiana 'por Esperanto' fra gli italiani insegnanti", kun pozitiva rezulto, ĉar ĝi estis efektive fondita en Florenco la 16-an de novembro 1913. Bedaŭrinde tiu organizaĵo, kiel cetere multaj aliaj, malaperis, sekve de la milito 1915-18. Sed alia grava, peza kaj respondeca ofico atendis prof.on Grazzini: la "Katedro de Esperanto", kiu en la 1932-a ŝanĝis la nomon en "Itala Instituto de Esperanto". Li komencis ĝian funkciigon en 1922 kiel Sekretario, kaj de 1925 ĝis 1962 li estis ĝia Ĝenerala Direktoro. Intertempe pere de kursoj, libroj kaj multaj artikoloj li senlace laboris por disvastigo de Esperanto. Vere admirinda tiu persista agado, se oni pripensas, ke la du mondaj militoj ĉion detruis, kaj ĉiufoje necesis rekomenci la agadon preskaŭ el la fundamentoj. Sed tio, kio aparte rilatas nian katolikan movadon, estis ke, la 4-an de oktobro 1920, dum la 5a Itala Esperanto-Kongreso, en kies kadro estis organizita la 1-a Kongreso de la Italaj Katolikaj Esperantistoj, kun la beno de papo Benedikto XV, ĝuste prof. Grazzini lanĉis la unuan ideon por la starigo de UECI (Unione Esperantista Cattolici Italiani). Ni lasas ĉi tie la vorton al s-ano Minnaja:

"La propono - li diris - estis tuj akceptita kun simpatio, ĝi vigligis interesan diskuton, kiu kulminis en tagordo aprobita unuanime, per kiu estis fondita la "Unione Esperantisti Cattolici Italiani" kaj estis elektita direkta komitato konsistanta el s-oj Grazzini el Florenco, prezidanto, Pizzi el Venecio kaj Saggiori el Padovo. La postan jaron 1921-an dum la 2-a Kongreso de la Italaj Katolikaj Esperantistoj, disvolviĝinta en Trento

la 16-an kaj 17-an de aŭgusto, kune kun la 6-a Itala Esperanto-Kongreso, la statuto de UECI, laŭ la tagordo de Grazzini, ricevis la definitivan aprobon kun pli ampleksa direkta Komitato, kaj prof. Grazzini fariĝis Ĝenerala Sekretario. Tian oficon li plenumis kun sia kutima zorgemo ĝis la 3-a Kongreso, kiu havis lokon en Venecio la 17-an kaj la 18-an de septembro 1922, dum kiu estis elektitaj kiel prezidanto P. Carolfi kaj kiel sekretario s-ano Pizzi".

Ankaŭ por la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Italujo en la jaro 1935-a, kongreso, kiu disvolviĝis tra diversaj italaj urboj, pro la alveno de la kongresanaro en Florenco, prof. Grazzini devis streĉe labori. Tiu, kiu ne havas personan sperton pri tiaj aranĝoj, malfacile povas imagi, kiom da klopodoj ili postulas. Kaj denove li surprenis sur siajn ŝultrojn la taskon de tiu organizado, kiam oni decidis, ke la 30-a Itala E-Kongreso en 1959 okazos en Florenco. Tiu, kiu vidis unu el la plej alta nombro da partoprenantoj en la italaj Esperanto-kongresoj, montris ankoraŭfoje, kiel valora homo estis prof. Grazzini, al kiu la Itala Esperanto-Movado multe ŝuldas, kaj aparte nia UECI, kiu memoros lin kun neesprimebla admiro kaj dankemo.

## VETERANO MORTIS!

Funebras la Florenca kolegaro,
l'adeptoj tristas de la "Nova Sento";
de l' nordaj Alpoj ĝis la suda maro
penseme restas l' Esperanto-gento.

Forpasis tra la varmo de l' fervoro
soldato nobla de la pac-batalo,
al frata amo sonoril-sonoro,
ardanta flam' por alta idealo.

La strebo ĉesis kun la kor' pasia,
sur la papero haltis laca mano;
la Esperanto-Institut' Nacia
priploras la forperdon de l' Dekano.

Fermiĝis buŝo, kiu plaĉe vortis:
Grazzini, l' olda veterano, mortis!

Roma, 26/9/1971 Luigi Minnaja

RICEVINTE LA ĈAGRENAN informon pri forpaso de s-anino Ruzena Kaplerovà, okazinta la 24-an de septembro en Praha, ni levas niajn preĝojn por ŝia animo kaj niajn kondolencojn al la filino Jindra.

PREZIDANTO DE T.E.J.O. (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) dum la Junulara Esperantista Kongreso de Edimburgo celebrita en aŭgusto, estis elektita nia roma s-ano D.ro Renato Corsetti, Direktoro de la Esperanto-fako de Radio Roma. Al nia valora juna samideano, kiu jam de kelkaj jaroj laboras kun rimarkinda frukto en la junulara kampo, ankaŭ UECI aldonas korajn gratulojn kaj bondezirojn.

KOLEKTO PRI ESPERANTO premiita dum Filatela ekspozicio. De la 4-a ĝis la 8-a de oktobro okazis en Romo granda filatela ekspozicio, organizita de grava entrepreno "Istituto Farmacoterapico Italiano", kiu fabrikas medikamentojn; pro tio rajtis partopreni en la ekspozicio nur kuracistoj kaj apotekistoj, kaj laŭeble la kolektoj devis havi rilaton al medicino. Nia s-anino d.ro Vera di Tocco prezentis kolekton de poŝtmarkoj kaj specialaj poŝtstampoj kun la titolo: "Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kuracisto, kiu kreis Esperanton". La kolekto, kiu altiris la atenton de la publiko pro sia originala karaktero, gajnis arĝentan medalon. (El Radio Roma-

Esperanto 17/10/71). Ankaŭ CECR kore gratulas sian fervoran membrinon.

ALIĜIS AL UECI-CECR por 1972:
Romo: P. Jacobitti; L. Minnaja; Sr. Engelmunda; R. de Angelis; J. Petschann; Costermano (VE): F. Ruaro; Padovo: C. Minnaja; Torino: S. Brusa; Verono: J. Marchiori; Germanujo: R. Skorupa; J. Miller; Hispanujo: R. Molera; I. Chavarri; Kat. Esp. Hisp. As.; Hungarujo: L. Sleiner; Nàadi F.; Pollando: H. Paruzel kaj 50 aliĝintoj; T. Kalfas; J. kaj H. Zielonka; A. Blaszczyk; J. Kasinski; K. Martinski; Lech Paluch; P. Janik; Rumanujo: F. Pall. Entute 77.

Pastroj, kiuj intencas aliĝi, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti senpagan sendadon.

RADIO ROMA-ESPERANTO. Novembro 1971-a:
Unua parto: "Novaĵoj el Italujo kaj kanzonoj en Esperanto". Dua parto: "Kuriero de Esperanto".
La dissendoj okazas ĉiun dimanĉon, de h.21.00 ĝis 21.20 (MET). Ondlongoj: m.25,42; 30,90; 41,24.

..................................................

El Romo, centro de la katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj la agado de la eklezio:

..................................................

LA ROMA EPISKOPA SINODO, ĉimomente en sia plena disvolviĝo, estas la ĉefa eklezia evento de ĉi tiu periodo. 210 estas ĝiaj membroj, 14 la episkopoj reprezentantoj de la orientaj katolikaj eklezioj, 141 tiuj de la e

piskopaj konferencoj de ĉiuj nacioj de la mondo. Dek ĝeneralaj superuloj, reprezentantoj ankaŭ por ĉiuj aliaj; dek naŭ kardinaloj estrantaj la romkuriajn oficojn. 32 estas la afrikaj episkopoj, 44 tiuj de la du Amerikoj, dudek aziaj, 5 de Aŭstralio-Oceanio, 40 eŭropaj. La ĝenerala sinoda sekretario estas mons. Ladislao Rubin. Por la temo de la ofica sacerdoteco referis kard. Hoeffner pri la doktrina parto, kaj kard. Tarancon pri la praktika. Pri la temo "Justeco en la mondo" referis la filipina mons. Valderrama. Mons. Bartoletti donis enkonduke panoramon de la problemoj estiĝantaj en la vivo de la eklezio. Dum la laboroj estas antaŭvidita komunikaĵo pri "La fundamenta leĝo de la eklezio", pri kio tamen ne okazos diskutoj, ĉar la grava iniciato estas ankoraŭ longe pristudenda. La laboroj disvolviĝas en la nova sinoda aŭlo, kiu havas kapablecon de 350 sidlokoj; dum la salonoj ĉirkaŭaj servos por la lingvaj grupoj. Je la unua fojo en la historio de la "persatelitaj" komunikoj, du televidaj preskonferencoj estis senditaj trans la atlantikan oceanon. Tiel la latin-amerikaj episkopoj ĉeestantaj en Romo estis rekte intervjuitaj de ĵurnalistoj en la ĉefaj urboj de la latina Ameriko, la 14-an de oktobro pri la unua temo, la 21-an pri la dua temo de la sinodo. Estis ankaŭ antaŭviditaj en la programoj kelkaj liturgiaj servoj: la 10-an de oktobro, inaŭguro de la nova preĝejo dediĉita al S. Gregoro Barbarigo, la sanktulo enkanonigita de Johano XXIII: preĝejo decidita kiel omaĝo de la katolika mondo al la papo okaze de lia 80-a jaraĝo. La 17-an, solena beatigo de p. Maksimiliano Kolbe, kun la partopreno de la papo mem, kiu ordinare partoprenas nur en la enkanonigaj ritoj; kaj la 24-an okaze de la "Pormisia Tago".

Kunveno tiel altnivela, kiel la sinodo, de la plej kvalifikitaj personoj por la pritraktado de eklezia problemoj, estas tiel riĉa je tre interesaj studoj, ke oni ne

povas facile resumi ilin. Oni pripensu, ke ĉiu "patro" devis raporti pri la laboroj de sia nacia episkopa konferenco; ke ili mem ofte ne povis legi entute la prepari tan referaton, sed nur etan parton, transdonante la tutan tekston al la komisionoj por la plua laboro; ke tiuj komisionoj, - 12 - elektitaj laŭ la lingvoj, devis kolekti, kompari, dividi, resumi, eltiri el tiuj materialoj la diversajn studojn, proponojn, ktp. faritajn. Oni povas tamen aserti, ke la figuro de la pastro estis konsiderita sub la plej diversaj aspektoj, laŭ la evangelio, la historio, teologio, psikologio; laŭ la tradicia doktrino kaj la konkretaj postuloj de nia tempo; laŭ la vivo en komuneco aŭ en izoliteco; oni diskutis pri la pastra formigo, ĝiaj oficoj, la paŝtista aŭ laborista tasko, la sankteco de la vokiĝo, la danĝeroj komunaj kaj propraj al la sacerdota vivo; la disponebleco sub la aŭtoritatoj, la ekonomia stato, la influo de la mondo, la reveno al la laika stato... ktp., ktp. Dum pri tio, kio rilatas precipe vokiĝon kaj sakramenton restas ne difineblaj konturoj kaj ne sondeblaj profundecoj. Unu tamen el la plej debatitaj problemoj estis tiu de la celibato, t.e. ne ĉu pastro povas edziĝi, ĉar jam de la Dua Vatikana Koncilo la episkoparo unuanime respondis negative; sed ĉu al edziĝintaj homoj oni povos doni la sacerdotan ordinon. Pro tio fakte oni insistis de multaj. Ĉiuj ja konsentas, ke ne ekzistas esenca opozicio inter edziĝinta kaj sacerdota stato. Eĉ, en la Orienta katolika eklezio ĉiam ekzistis ambaŭ specaj pastroj. Plue, en multaj lokoj oni agnoskas, ke la pastraro estas tute ne sufiĉa por la postuloj de la paŝtista agado. Tamen la unua parto de la sinodaj laboroj, kiuj portis tiom da lumo al la figuro de la katolika sacerdoteco, ŝajnas konkludiĝi per rekonfirmo de la ĝisnuna sinteno de la eklezio rilate al ĉi tiu problemo.

Nun oni pridiskutas la duan: "Justeco en la mondo":


tre grava problemo, ĉar ĝi implicas ne nur prijuĝon de multaj situacioj ĉe diversaj nacioj - ne tiel simple difineblaj laŭ la morala aspekto - sed ankaŭ prijuĝon de ĝia mem vivsinteno.

Enkonduke raportis mons. Teopisto Alberto, ĉefep. de Caceres en Filipinoj, laŭ la linioj de tiu, kiu estis proponita de la S. Seĝo, ne kiel pridiskutenda dokumento, sed kiel prepara skemo aŭ bazo por diskutoj. Li reliefigis la taŭgecon de la temo pri internacia justeco, ĉar la sinodo de la episkopoj de la tuta mondo - li deklaris - estas aparte kompetenta pri tio. Oni devos pri memori la rajtojn de la homaro kaj deklari la sintenon de la eklezio antaŭ la nejusta regado de riĉaj kaj potencaj ŝtatoj sur la malriĉaj. Tia regado politika, ekonomia, aŭ kultura, aŭ ĉio kune, kaj ĉiaspeca koloniismo estas kontraŭ la fundamentaj rajtoj de la popoloj. Por ilia libero kaj evoluo sufiĉas nek karitato nek almozo, sed oni postulas justecon je tutmonda nivelo, laŭ la admono de la encikliko "Populorum progressio". Sed la sinoda dokumento alvokas al revizio pri riĉecoj de la eklezio mem kaj pri ilia administrado, pri la justa pritraktado de la laboristoj, pri libero de penso kaj de parolo, sen kio la eklezio ne povus esti kredata kaj aŭskultata.

Dimanĉon, la 17-an de oktobro, la papo prezidis, en la baziliko de Sankta Petro, la ceremonion de beatigo de P. Maksimiliano Maria Kolbe. Pli ol 30.000 fideluloj alvenintaj el ĉiuj mondpartoj, inter kiuj ne malpli ol 5.000 polaj, kaj multaj el Germanujo, Japanujo kaj Usono, plenigis la Vatikanan bazilikon. La ĉeesto de la sinodaj Patroj donis al la ceremonio specialan signifon.

Ni donas la ĉefan parton de la parolado de la papo, okaze de la solena beatigo:

# APOSTOLO, SACERDOTO, VIKTIMO



Kiu estas Maksimiliano Kolbe? Vi tion scias, vi lin konas. Pri li, tiel proksima al nia generacio, tiel ensorbinta la sperton travivitan en ĉi tiu nia tempo, ĉion oni scias. Verŝajne malmultaj aliaj procesoj pri beatigo estas tiom dokumentitaj kiom ĉi tiu. Nur pro nia moderna pasio por la historia vero ni legas nun, kvazaŭ epigrafe, la biografiajn notojn pri Patro Kolbe, verkitajn de unu el liaj plej diligentaj studemuloj.

"P. Maksimiliano Kolbe naskiĝis en Zdunska Wola, apud Lodz, la 8an de januaro 1894a. Enirinte en 1907a en la Seminarion de la Fratoj Minoraj Konventaj, li estis sendita al Romo por daŭrigi la ekleziajn studojn ĉe la Pontifika Gregora Universitato kaj ĉe "Seraphicum" de sia ordeno.

Dum li estis ankoraŭ studento, li elpensis institucion: la "Milico de la Senmakulino".

Ordenita sacerdoto la 28an de aprilo 1918a kaj reirinte al Pollando, li komencis sian apostolecon pri Maria precipe per la monata periodaĵo "Rycerz Niepokalanej" (La Kavaliro de la Senmakulino), kiu atingis unu milionon da ekzempleroj en 1938a.

En 1927a li fondis la "Niepokalanòw" (Ĉivito de la

Senmakulino), centron de religia vivo kaj de diversaj formoj de apostoleco. En 1930a li forveturis al Japanujo, kie li fondis alian similan institucion.

Reveninte definitive al Pollando, li sin dediĉis komplete al sia agado kun diversaj religiaj publikaĵoj. La dua mondmilito surprizis lin, dum li estis ĉefo de la plej impona eldona komplekso de Pollando.

La 19an de septembro 1939a li estis arestita de la "Gestapo", kiu deportis lin antaŭe al Lamsdorf (Germanujo), poste en la antaŭjuĝan koncentrejon de Amtitz. Liberigita la 8an de decembro 1939a, li revenis al Niepokalanòw kaj rekomencis la interrompitan aktivecon. Arestita denove en 1941a, li estis enfermita en la Pawiak-karcero, en Varsovio; kaj poste deportita en la koncentrejon de Oswiecim (Auschwitz).

Oferinte la vivon anstataŭe de iu nekonata mortkondamnito, li estis enfermita en iu bunkro, por morti tie pro malsato. La 14an de aŭgusto 1941a, antaŭtagon de la festo de la Ĉielenpreno de Maria, mortigita per venena injekto, li redonis sian belan animon al Dio, asistinte kaj konsolinte siajn kunulojn je malfeliĉo. Lia korpo estis kremaciita." (P. Ernesto Piacentini, Ofm. Konv.)

Sed en ceremonio, kia la nuna, la biografiaj notoj malaperas en la lumo de la grandaj ĉefaj trajtoj pri la sinteza figuro de la nova Beatulo; kaj ni fiksu dum momento la rigardon sur ĉi tiuj trajtoj, kiuj lin karakterizas kaj transdonas al nia memoro.

Maksimiliano Kolbe estis apostolo pri la kulto al la Madono, laŭ ŝia unua, origina, privilegiita brilo, tiu de ŝia difino en Lurdo: la Senmakula Koncipiĝo. Estas neeble disigi la nomon, la aktivecon, la mision de Beata Kolbe disde tiu de Senmakula Maria. Estas li, kiu fondis la Milicon de la Senmakulino ĉi tie, en Romo, jam antaŭ la sacerdotiĝo, la 16an de oktobro 1917a. Ni

povas hodiaŭ memorigi la datrevenon. Estas konate, ke la humila kaj milda Franciskano kun nekredebla aŭdaco kaj kun eksterordinara organiza genio disvolvis la iniciaton kaj faris el la devoteco al la Patrino de Kristo, kontemplata en la suna vesto (Apok. 12,1), la fokusan punkton de sia spiriteco, de sia apostoleco, de sia teologio...

Ĉi tiuj notoj pri devoteco al Maria de la nova Beatulo lin kvalifikas kaj klasifikas inter la grandaj sanktuloj kaj la profetaj spiritoj, kiuj komprenis, kultis kaj prikantis la misteron de Maria.

Poste, la tragika kaj sublima epilogo de la vivo sen kulpa kaj apostola de Maksimiliano Kolbe. Al tio oni precipe ŝuldas la gloradon, kiun hodiaŭ la eklezio celebras, de la humila, milda, agema religiulo, ekzempla disĉiplo de Sankta Francisko kaj kavaliro enamiĝinta al la Senmakula Maria. La bildo pri lia fino en la tempo estas tiel terura kaj korŝira, ke ni preferus ne paroli pri ĝi, neniam plu kontempli ĝin, por ne vidi kien povas alveni la malhumana malnobliĝo de la perforto, kiu el la sensenta krueleco super estaĵoj, reduktitaj al sklavoj sendefendaj kaj destinitaj al ekstermo, faras al si piedestalon de grandeco kaj de gloro; kaj estis milionoj tiuj estaĵoj oferitaj al la orgojlo de la forto kaj al la frenezo de la rasismo. Oni devas tamen repensi pri ĉi tiu bildo malluma, por povi ekvidi tie kaj tie kelkan fajreron de postrestanta humaneco. La historio ne povos, ve!, forgesi ĉi tiun sian teruran paĝon. Kaj tiam ĝi ne povos ne fiksi la rigardon konsternitan sur la punktoj lumaj, kiuj konigas, sed samtempe venkas, ĝian nekoncepteblan mallumon. Unu el tiuj punktoj, kaj probable la plej arda kaj plej briletanta, estas la figuro elĉerpita kaj trankvila de Maksimiliano Kolbe. Heroo trankvila kaj ĉiam pia kaj pendanta de paradoksa kaj tamen pravigita konfido. Lia nomo restos inter la granduloj,

malkaŝos kiaj rezervoj de moralaj valoroj troviĝas ĉe tiuj amasoj malfeliĉaj, glaciigitaj de la teruro kaj de la malespero. Super tiu grandega vestiblo de morto, jen ŝvebas dia kaj nepereema parolo de vivo, tiu de Jesuo, kiu malkaŝas la sekreton de la senkulpa doloro: esti pentofaro, esti viktimo, esti ofero, kaj fine esti amo: "Ne estas amo pli granda ol tio, ke iu donas sian vivon por siaj amikoj" (Joh. 15:13). Jesuo parolis pri si en la proksimeco de sia fordono por la savo de la homaro. La homoj estas ĉiuj amikoj de Jesuo, se ili almenaŭ aŭskultas lian parolon. Patro Kolbe realigis, sur la fatala kampo de Oswiecim, la sentencon de la elaĉetanta amo. Je duobla motivo.

Kiu ne memoras la senkomparan epizodon? "Mi estas katolika sacerdoto" li diris oferante sian vivon al la morto - kaj kia morto! - por ŝpari al la pluvivo nekonatan kunulon de malfeliĉo, jam destinitan por la blinda venĝo. Estis momento granda: la ofero estis akceptita. Ĝi naskiĝis el koro hardita al fordono de si, kiel natura kaj spontana, preskaŭ kiel sekvo logika de sia sacerdoteco. Ĉu Sacerdoto ne estas "alia Kristo"? Ĉu ne estis Kristo Sacerdoto la viktimo elaĉetanta la homaron? Kia gloro, kia ekzemplo por ni Sacerdotoj rekoni en ĉi tiu nova Beatulo interpretanton de nia konsekro kaj de nia misio! Kia admono en ĉi tiu horo de necerteco, en kiu la homa naturo volus iufoje igi siajn rajtojn superaj al la supernatura vokiĝo por la tuta fordono al Kristo en tiu, kiu estas vokata al lia sekvo! Kaj kia konsolo por la tre amata kaj noblega legio kompakta kaj fidela de la bonaj pastroj kaj reliĝiuloj, kiuj, ankaŭ en la legitima kaj laŭdinda klopodo elaĉeti sian mision el la persona mezvaloro kaj el la socia vanigo, tiel konceptas ĝin: mi estas katolika Sacerdoto, tial mi oferas mian vivon por savi tiun de la aliaj! Ŝajnas ĉi tiu la tasko, kiun la Beatulo lasas precipe al ni, servistoj de la

eklezio de Dio, kaj analoge al tiuj, kiuj akceptas ĝian spiriton.

Kaj al ĉi tiu sacerdota motivo aldoniĝas alia; alia pruvanta, ke la ofero de la Beatulo havis sian pravigon en amikeco: li estis Polo. Kiel Polo li estis kondamnita al tiu terura "Lager", kaj kiel Polo li interŝanĝis sian sorton kun tiu, al kiu la samlandano Francisko Gajowniczek estis destinita; tio estas: li suferis la punon kruelan kaj mortigan anstataŭ li. Kiom da aferoj naskiĝas en la animo memore de ĉi tiu aspekto homa, socia kaj rasa de la memvola morto de Maksimiliano Kolbe, filo, ankaŭ li, de la nobla kaj katolika Pollando. La historia destino je sufero de ĉi tiu nacio ŝajnas dokumenti en ĉi tiu okazo tipa kaj heroa la jarcentan vokiĝon de la Pola popolo por trovi en la komuna pasio sian unuecan konscion. Ĝia kavalireca misio al la libero atingita en la fiero de la spontana ofero de siaj filoj, kaj ilia preteco sin doni unuj por la aliaj por la superado de sia viglеco en nevenkita konkordo, ĝia karaktero neforigeble katolika, kiu ĝin sigelas membro vivanta kaj pacienca de la universala eklezio, ĝia firma konvinko, ke en la mirinda, sed suferita protekto de la Madono estas la sekreto de ĝia renaskiĝanta florado, estas ĉielarkaj radioj, kiuj dise eliĝas el la nova martiro de Pollando kaj briligas la aŭtentikan vizaĝon fatalan de ĉi tiu lando, kaj igas nin petegi de la Beatulo, ĝia tipa heroo, la firmecon en la kredo, la ardon en la karitato, la konkordon, la prosperon kaj la pacon de ĝia tuta popolo. La eklezio kaj la mondo pri tio ĝojos kune. Tiel estu.

LA INTERNACIA KONGRESO pri Katekizado celebriĝis en Romo ĉe la Laterana Universitato de la 20-a ĝis la 25-a de septembro. La moderna instrumaniero tro malproksima de tiu de la katekismo ordonita de Pio X, postulis jam en la Dua Vatikana Koncilo novan prilabo-

radon, kiu, respektante la eternajn revelaciitajn verojn kaj adaptante al la nuntempo la ŝanĝiĝeblajn, donu novan prezentiĝon de la tuta eklezia doktrino. Oni fervore komencis la studojn, kaj la 11an de aprilo 1971a la Roma Kongregacio por Klerikaro diskonigis la "Ĝeneralan Katekizan Regularon", kiu ne anstataŭas la naciajn katekismojn, sed helpas ilin donante konsilojn pri naturo, celoj, fontoj, instruoj kaj rilatoj de katekizado kun la eklezia kaj liturĝia paŝtista agado. La Regularo siaflanke sugestis komparon inter la novaj spertoj faritaj ĉe la diversaj regionoj, kaj inspiris la nunan kongreson. Ĉi tiu vekis tuj grandan intereson, kaj tio montriĝis el la partopreno de ĉirkaŭ mil fakuloj el preskaŭ ĉiuj mondnacioj: almenaŭ la duoblo de la antaŭviditaj. La kongreso, kvankam montris diversajn orientiĝojn pro la diverseco de pensmaniero ĉe multaj popoloj, donis tamen konfirmon pri la unueco de la eklezio kaj pri la perfekta kunlaboro de la episkopaj konferencoj kun la Sankta Seĝo. La papo ricevis en aŭdienco la kongresanojn, kaj parolis pri la temoj de la kongreso ankaŭ en la ĝenerala aŭdienco al la kredantaro en la baziliko de S. Petro, reliefigante la neceson de serioza studo pri la diavorto ankaŭ en nia tempo, kiu, fiera pro siaj sciencaj progresoj, estas ema neglekti la spiritajn.

AL LA 80-JARA Kard. JOZEFO Mindszenty, Primato de Hungarujo, amnestiita de lia registaro, estis permesite forlasi la Usonan ambasadejon en Budapeŝto, la 15-an de septembro, por iri al Romo senrevene. Tiel elirinte, li alvenis aviadile al Romo la saman tagon. De dek kvin jaroj li estis rifuĝinta en la Usona ambasadejo por eskapi el nova enkarcerigo, post kiam li jam suferis tion dum sep jaroj (26a de dec. 1948 - 1955), kaj el kontrolita loĝejo, el kiu li estis liberigita dum 5 tagoj, per la revolucio, ĝis kiam la soveta armeo intervenis

en Hungarujon. En la Roma flughaveno Fiumicino salutis lin kard. Villot, Ŝtata Sekretario; kaj en Vatikano, kien li tuj sin direktis, la papo mem iris renkonte al li; kaj depreninte sian paŝtistan krucon kaj la ringon, kiun de la fermo de la Koncilo li portis, li donis ilin al la hungara kardinalo. Lastatempe la papo mem, ankaŭ konsidere de la farto de la kardinalo, varme invitis lin veni al Romo, deklarante, ke li konservos la ĉefepiskopan titolon de Esztergom kaj de Primato de Hungarujo. Apostola Administranto de Budapeŝto estis elektita mons. Kisberg. Kard. Mindszenty estis unu el la celebrantoj kun la papo dum la solena meso de la Beatigo en S. Petro.

FUNKCIAS EN ROMO LA UNUA kaj unika fakultato pri Orienta kanona juro ĉe la papa Instituto por Orientaj studoj. La institucia dekreto estis proklamita jam de kelkaj monatoj el la Kongregacio por la Katolika Instruado. Ĝis nun funkciis en tiu instituto kanonjura sekcio aprobita de la iama Kongregacio por Seminarioj kaj Universitatoj. En tiu la Orienta kanona juro estis instruata je scienca nivelo kaj la lernantoj povis ricevi doktoran diplomon pri ĝi ĉe la fakultato de la kanona juro en la Gregora Universitato. La aktuala dispozicio ne nur donas oficialan aŭtonomion al la nova fakultato, sed estas ankaŭ plua elmontro de alta estimo al la kristana Oriento, kies kanona juro estas riĉa pro sia enhavo kaj grava pro sia antikveco. Ĉi tiu ekumena signifo akiras pli grandan gravecon pro la fakto, ke la nova fakultato estos frekventata de lernantoj de orientaj eklezioj katolikaj kaj ortodoksaj. La Papa Instituto por Orientaj studoj estis fondita en la 1917a de Benedikto XV kaj komisiita de Pio XII al la jesuitoj en la 1922a. Aktuala Rektoro estas tiu p. Ivano Zuzek, el la kroata jesuita provinco, kiu afable konsentis al CECR kunveni ĉiudimanĉe ĉe unu el siaj lernejaj ĉambroj.

DIOCEZO POR 200 MILIONOJ da animoj estis nomata la spirita zorgo, kiun la eklezio klopodas doni al la amaso pli kaj pli nombra da flug-vojaĝantoj. En la pasinta jaro ducent milionoj da personoj vojaĝis tiamaniere, el kiuj ok milionoj inter Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Konkludiĝis la 9an de oktobro en Romo, la Kvina Internacia Kongreso de Kapelanoj de la civila aviado, kongreso celebrita kunlabore kun la papa komisiono por elmigrado kaj turismo. Oni pristudis kune organizadon de la spirita helpo, kion oni devas doni al la fluglaborantaro vojaĝanta aŭ dungita por la aerodromoj, kiu atingas ĉe kelkaj el ili la nombron de 5-6 mil personoj; krom, kompreneble, la pasaĝeroj, kiuj, kvankam apartenas al ĉiuj eblaj kategorioj, havas grandnombre ian emon por ricevi spiritan mesaĝon.

14 JAROJ POST LA ENCIKLIKO de Pio XII "Fidei donum" kaj 6 post la Dekreto "Ad gentes", oni povas demandi, kiaj estas la rezultoj. La sacerdotoj "Fidei donum" celintaj Afrikon kaj la Latinan Amerikon dum ĉi tiu tempo estis ne malpli ol 3.000: 600 italaj, 500 francaj (el kiuj 280 por la nigra Afriko), 70 belgaj (preskaŭ ĉiuj al Afriko), 49 svisaj, kvindeko da nederlandaj, kvindeko da anglaj; 254 usonaj; ne malpli ol 1.500 hispanaj.

LA "FEDERACIO DE KRISTANAJ Organizoj por libervola internacia servo" faris finsomere sian bilancon. El ĝi oni informiĝas, ke ĝia somera aktiveco rilatis 804 gejunulojn; el kiuj 223 atingis la lastan preparon, tuj antaŭan al la vojaĝo por la Tria Mondo. 308 komencis tiun preparon, kaj 273 estis interesigitaj al la problemo. Partoprenis en la formigaj kampoj 452 viroj kaj 352 virinoj, 60 procente studentoj, meznombre 18-25-jaraj. La diversaj okupoj, kiujn ili pritraktos, temos pri studo kaj instruado, pri manlaboro kaj diversaj profesiaj aŭ religiaj taskoj. Ĉar la preparo daŭras alme-

naŭ unu jaron, oni antaŭvidas vintron 1971-72 pli aktivan kompare al la pasinteco.

ĈE LA FINO DE SEPTEMBRO okazis la 96a elsendo el Torino de salezaj misiistoj: 34. La dek unuaj elsendoj estis prezidataj de la fondinto mem, S. Johano Bosco, kiu komencis ilin la 11-an de novembro 1875, kun dek misiistoj celantaj Patagonon (Argentino). La rapida progreso de la saleza instituto devenas grandparte de la misia idealo, kiu donis al la eklezio pli ol 5 mil misiistojn. Ĉi tiu lasta sendaĵo, eĉ se ne estas inter la plej multenombraj, estas tamen signifoplena: ĝi enkalkulas 34 misiistojn el ok diversaj nacioj: 13 el Italujo, 7 el Pollando, 7 el Hispanujo, 2 el Usono, 2 el Brazilo, 1 el Francujo, 1 el Jugoslavio, 1 el Malto. La plej parto estas destinita al la Latina Ameriko, sed aliaj iros en Azion kaj Afrikon. En la 96 salezaj misiaj "rezidencoj" la baptitaj estas jam 1 miliono kaj 568.000.

KIAM PAŬLO VI, JULIE DE '69, en la ĉefurbo de Ugando substrekis la plenan rajton de Afriko preni sur sin siajn destinojn, li diris: "Vi Afrikanoj jam nun estas misiistoj de vi mem por via kontinento. Vi devas daŭrigi la konstruadon de la eklezio en via lando". En Eburbordo oni decidis plani la novan katekismon, kiu povu esti modelo por la multaj afrikaj eklezioj. Tre grava tasko, ĉar post la laboro farita de la fremdaj semantaj misiistoj, la katolika vivo aperis promesplena. La planteto enportita de ili devis tamen alklimatiĝi kaj fariĝi grenspecio entute Afrika. Pacienca, longa sed plene sukcesinta laboro: jam junaj aŭtoktonaj pastroj anstataŭis la fremdajn misiistojn, naskiĝis lokaj religiaj familioj flanke de la alilandaj, afrikiĝis la hierarkio, la tuta loka eklezio. La lando, kiu tiom suferis pro la pasinta koloniismo, nun estas tre singarda kontraŭ ĉio, kio memorigas ĉian ajn trudon de blankuloj. Tiel ankaŭ

la katekismo, restante katolika, devas esti enradikita sur la kulturo, sur la vivmaniero de la afrikaj popoloj. Tion sukcesis atingi la Eburborda katekismo, kiu per siaj 46 ĉapitro-lecionoj donas la dian vorton laŭ la afrika sento. Vivo, familio, komuno, estas la fortolinioj de la afrika evoluiĝo; kaj tiuj elementoj ĉiam troviĝas kiel bazo de la dia vorto. Afrikaj proverboj, simboloj, signoj adaptiĝas perfekte al la evangelio, kiu per ili estas klarigata, kaj ili montras la belecon kaj taŭgecon de la religiaj instruoj, malkaŝigas la dian saĝecon de la evangelio, indikas la vojon de l'homa evoluo laŭ la sava mesaĝo portita de Kristo al la mondo.

LERNEJO POR INSTRUO de la Bengala lingvo, malfermita al ĉiuj kristanaj konfesioj, funkcias ĉe Barisal, en la orienta Pakistano jam de sep jaroj. La iniciato estas subtenata de la Patroj de la Sankta Kruco, kiuj de pli ol cent jaroj laboras en tiu lando. Ankaŭ ĉijare troviĝas kontentiga nombro da partoprenantoj. Inter tiuj, krom la katolikoj, troviĝas diversaj baptistoj anglaj aŭ amerikaj, kaj luteranoj.

LA EKLEZIO DE KENJO naskiĝis en 1862 fare de la Irlandaj Patroj "de la Sankta Spirito". En la 1902a aldoniĝis la unuaj Patroj "de la Konsolita" el Torino. Dum preskaŭ sepdek jaroj de misia laboro, oni povas admiri ne malgrandajn fruktojn: seminarioj, hospitaloj, dispensarioj, lernejoj, porjunularaj centroj kreskis ĉie, kaj laŭgrade ili estis transdonitaj al la loka loĝantaro. Speciala instituto, la "Kenya episkopal conference" estis starigita tiucele de la Sankta Seĝo. Mons. Gatimu, la unua aŭtoktona episkopo, sukcesis aĉeti terenojn por ĉiuj siaj misiaj institutoj, preskaŭ ĉiuj jam nun direktataj de la indiĝenoj, kvankam ne mankas eŭropaj misiistoj, kiuj frate kunlaboras. La Fratinoj de "la Konsolita" konstruis en Nairobi la " Flora Hostelon", gran-

da centro por fraŭlinoj, venantaj el ĉiu Afrika parto. La katolikoj en Kenjo estas 1 miliono kaj duono, kaj ili estas entuziasme fervoraj. Ili amas kaj deziras la fremdajn misiistojn, ĉar ili portas "vastan tutrigardon sur la mondon", kondiĉe, ke ili venas ne por homaj celoj, sed por la Krista universala mesaĝo.

P. BENEDIKTO ZWEBER, usona misiisto de Maryknoll, estis premiita de la Sudkorea ĉefministro Jong-Pil Kim per la plej alta civilmerita medalo "Kamelio". Premio vere meritita, ĉar dum lia nur dekjara ĉeesto, li provizis la ses centrojn de insulo Deok Jeok per elektra kurento el centra generatoro. Laŭ liaj instruoj intensiĝis la rizkultivado, kiu alproksimiĝas jam al la ducent dudek mil kilogramoj, sufiĉa kvanto por la loĝantaro, kiu ne plu estos devigata enporti tion de la kontinento je alta kosto. Li konstruis grandan cisternon por trinkebla akvo kaj kanalojn por ĉiu parto de la insulo; hospitalon "Beata Petro Yu", laŭ la nomo de unu el la koreaj martiroj; lernejojn, ktp., tiel kontribuante al la ekonomia, saniga, instrua progreso de la tuta insula loĝantaro.

RENKONTIĜO EN VIENO inter katolikaj kaj malnov-orientaj teologoj okazis je la unua fojo en ilia historio de la 6a ĝis la 12a de septembro. Partoprenis 12 episkopoj kaj teologoj orientaj kaj 10 katolikaj. La eklezioj malnovorientaj estas tiuj, kiuj rifuzis la koncilajn dekretojn dum la epoko de la kristologiaj kontraŭstaroj. Ĝuste pri ĉi tiu temaro disvolviĝis la dialogo. Oni ne celis tamen el ĉi tiu unua kunveno sensaciajn rezultojn; sed oni volis meti la bazojn, kaj fiksi la liniojn por plia profunda analizado de la diversaj pensmanieroj kaj kristologiaj vidpunktoj. Ĉeestis membroj de la kvin antaŭkalcedonaj eklezioj (451 p.K.) nomataj tradicie "monofizitoj"; la koptortodoksa patriarko de Aleksandrio (kun

6 milionoj da kredantoj); la ortodoksa patriarko de Etiopio (9 milionoj); reprezentantoj de la siri-ortodoksa eklezio de Antiokio (160.000 kredantoj); de la siri-ortodoksa de Hindujo (1 miliono); de la eklezio armen- apostola kun ĝiaj du branĉoj de Sovetunio kaj de Ĉiliĉio, kaj kun la patriarkécoj de Jerusalemo kaj Konstantinopolo (4 milionoj da fideluloj). Estis reprezentitaj ankaŭ la eklezio siri-orienta antaŭ-efesa (431 p.Kr.), nomata "nestoria" (200.000 fideluloj) kaj la sendependa eklezio sirio-malabara, kiu en la 19a jarcento disiĝis de la siri-orienta (300.000 fideluloj).

PARTA, SED GRAVA AKORDO estis atingita inter katolikoj kaj anglikanoj, alveninte, post longaj laboroj, al komuna deklaro pri la reala ĉeesto de Kristo en la eŭkaristio. Pro tio oni volis uzi novan sed precizan terminologion, por eviti la malnovajn danĝerajn disputojn kaj la kutimajn miskomprenojn. Restas ankoraŭ aliaj diverĝoj pri kelkaj doktrinaj punktoj; sed oni pritaksas ilin ne gravaj. Inter ili tiu de la sacerdota ordino. Sed oni opinias, ke komuna doktrino pri eŭkaristio malpliigos la Romajn obĵetojn ĉirkaŭ ĝi. La koncerna teksto, redaktita de la miksa komisiono anglikana-katolika, kunveninta en la kastelo de Windsor, estis transdonita al d.ro Ramsey, angl. episk. de Canterbury kaj al Paŭlo VI; kaj preskaŭ certe ĝi estos ekzamenata en la plena kunveno de la Sekretariato por Unuigo de Kristanoj. Dume kontaktoj inter la du eklezioj daŭras en Usono, Britujo, Kanado, Aŭstralio, kaj ĉefe en Sudafriko.

---

ABONKOTIZO: £. 1.000 (Us.dol.1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C.C.Ferrari
aŭ pĝk. al : 1-37638 - P.Giacinto Jacobitti

---